

La uzado de nia lingvo, de tiu plej efika skema normlingvo, devigas al saĝa sinlimigo en la vortuzo, al evitado de ne necesaj novvortoj.

LA REDAKCIO,

413.164 : 025.45

UNIVERSALA DEKUMA KLASADO KAJ TERMINOLOGIO

de inĝ. RUDOLF HAFERKORN.

1. Grava rekomendo de d-ro inĝ. Eugen Wüster.

Wüster jam ofte emfazis ke la esperantistoj devus aligi siajn terminarojn al tiu de ISO. Pri la laŭafera interplektiĝo de terminologia laboro kaj fakdivido li raportis jenon¹⁾:

„La nocia flanko de esprimoj, tio signifas la unueca fiksado de preciza signifo estas multe pli grava ĉe terminara laboro ol ĉe prizorgo de la konversacia lingvo. Senĉese esprimoj de simila signifo devas esti komparataj unu kun la alia kaj iliaj signifoj reciproke limigataj. Tial nur la sinsekvo laŭ sistema vidpunkto, kaj ne laŭ abc-sinsekvo, estas uzenda por altvaloraj terminaroj.

La Teknika Komitato ISA 37 „Terminologio“ ekde la komenco decidis uzi kiel sisteman sinsekvon por ISO-terminaroj la Universalan Dekuman Klasadon (UDK). Jam antaŭe la bone-konataj unulingvaj UDK-eldonoj povis esti uzataj kiel altvaloraj fakvortaroj, se oni metas plurajn lingvojn unu apud la alian; la sistema sinsekvo tie preskaŭ anstataŭas difinojn. La ISO-vortaroj ordigitaj laŭ la UDK ege plialtigas la precizecon, kompletigante la apartajn UDK-indicojn per difinoj.

La internacia kompletigado de la UDK okazas dum multaj jaroj en la kadro de la *Fédération Internationale de Documentation (FID)*²⁾. La interplektiĝo de fakoj ĉe la terminologia laboro respeguliĝas, rigarde al la vidpunkto de la organizado, en la fakto ke la komitato TC 37 ĉiam intime kunlaboris kun FID. Ankaŭ la terminologiaj komisionoj de multaj naciaj normigasocioj intime interrilatas kun la naciaj suboficejoj de FID.

Pro tio ankaŭ ne estas mirinde ke FID, tuj post la apero de la UNESKO-raporto pri fakvortaroj, dissendis cirkuleron pri tiu ĉi publikigaĵo al la membroj de sia „konsilantaro“. Per tiu cirkulero la ĝenerala sekretario de FID petas diskuti pri la UNESKO-raporto en ĉiuj naciaj oficejoj de dokumentado. Ĉe tio ankaŭ tiuj proponoj de d-ro Holmstrom estu atentataj kiuj celas

¹⁾ E. Wüster, „Die bevorstehende Konzentration der internationalen Terminologiearbeit“, raporto por la 18-a FID-kunsido en Romo (Sept. 1951), publikigita en „Österreichischer Maschinenmarkt u. Elektrowirtschaft“, 6 1951.

²⁾ Ties adreso estas Willem Witsenplein 6, Den Haag, Nederlando.

(R. H.)

fari pli facile altreblaj al la seriozaj interesiĝuloj la fakvortarojn troviĝantajn en publikaj bibliotekoj.

La rezultoj de ĉiuj ĉi diskutoj devas esti prezentataj al la Universala Kongreso por Dokumentado, kiu okazos en septembro 1951 en Romo.”

2. Kion ni faru nun en la Terminologia Sekcio de I.S.A.E.?

Ni mencias — eble iomete tro malfrue — la ĉi supran tekston de Wüster, por direkti la atenton de niaj anoj al la necesega tasko, bazi ĉiujn terminarojn sur la UDK- kaj ISO/FID-indicoj (ŝlosil- aŭ indicaj numeroj). Do nepre necesas ke ĉiu esperantisto kiu ekverkas fakvortaron, havigas al si la koncernan plenan fakparton de la UDK-tabeloj en sia propra lingvo (havebla pere de la landa normiga komisiono). Sed ni samopinias kun P. Marelli, kiu emfazis en sia studo pri „Teknikaj Vortaroj“³⁾ ke la UDK-tabeloj solaj ne sufiĉas por envicigi ĉiujn terminojn de certa fako, ĉar la UDK-tabeloj reprezentas ĉefe listojn de fakoj kaj iliaj subfakoj, kaj en ili mankas multaj nomoj, terminoj kaj nocioj kiujn oni bezonas en terminaro. Pri la problemoj, adapti la UDK-tabelojn al la bezono de la terminologio, Wüster komunikas al ni jenon: „La loko por la koncernaj nocioj en la plej multaj kazoj estas donata jam per la UDK-sistemo. Multajn nomojn oni devas enordigi ĉe iliaj supernocioj. Laŭprincipe estas neeble ke ĉiu termino aŭ nomo estas konforma kun aparta UDK-indico. Kontraŭe, oni devas aldoni al la koncerna jam ekzistanta UDK-numero kromajn numerojn kurantajn — disigante ilin per iu taŭga signo, ekz. per *komo* (,) — por enordigi la kromajn nomojn aŭ terminojn.”

Por klarigi tion, ni citas kiel ekzemplon la komencan parton de la UDK-tabelo el la fako *Elektro* (UDK 537), subparto de *Fiziko* (UDK 53). La enigitaj terminoj tie aperas sub la apartenanta supernocio kun aparta kroma indica numero, lokita post *komo*. Ĉiu elektra „(mezur-)unu“ sekvas tuj post la apartenanta elektra „grando“ kun la aldona signo „u“. Jen la listo:

Fizika Terminaro. Parto UDK 537 = Elektro.

UDK-indico	Esperanta Termino
537	<i>elektro</i>
537.11, 1	elektrigi (aliformi en elektron)
2	elektreco (la stato aŭ propreco, esti elektra aŭ elektre servata)
3	elektrecigi (fari ion ke ĝi fariĝas elektre servata)
537.122, 2	elektrono
537.2, 1	elektrostatiko
.21, 2	influki (= influencigi)

³⁾ P. Marelli, I dizionari tecnici, en „Macchine“, fakrevuo de la itala metal-industrio, Milano, Majo 1952 (UNESKO-broŝuro Ref. 66/2 D 03).

- .212, 1 elektra kampo
 2 kampa linio
 3 kampa tubo
 4 elektra kamp-intenso
 5 elektra indukto
 6 (elektra) indukdenso aŭ ŝovodenso
 7 elektra polarizo
 8 distordo
 9 elektra dipolmomanto
- .213 elektra potencialo
- .214, 1 elektrokvanto
 1u 1 ku'ombo
 2 amperhoro
- .214, 11 elektra flukso
 2 elektra energio
 2u 1 ergo
 2 julo, vatsekundo
 3 kilovathoro
 3 povumo (= potenc(i)o)
 3u 1 vato, voltampero
 2 kilovato

Analoge envicigendaj estas la ceteraj terminoj, ekz. la unuoj *volto*, *ampero* kaj *omo*, post iliaj apartenantaj grandoj *tensio* (aŭ *elektromova forto*), *kurent-intenso* kaj *rezisto*.

Tutkompreneble la esperantista terminologiisto ne rajtas arbitre apliki aldonajn numerojn indicajn, se jam ekzistas iu normigita terminaro de la koncerna fakoj. Pro tio estas rekomendinde ke la esperantista verkanto interrilatas kun FID, antaŭ ol li komencas fari terminaron, por informiĝi pri la indicaj listoj jam fiksitaj en ekzistantaj terminaroj. *Wüster* atentigis nin ke d-ro *Holmstrom*⁴⁾ ankaŭ kolektas informojn pri plurlingvaj vortaroj kiuj estas *estigantaj*. Tio estas tre oportuna por ĉiuj kiuj intencas ekverki iun fakvortaron, kaj tio helpas eviti neekonomian duoblan laboron kaj disiĝon de la fortoj. Tial *Terminologia Sekcio (TS)* de I.S.A.E. intencas, letere peti d-ron *Holmstrom*, ĉu li volas deklari sin preta transpreni la taskon de *inform-centro* por Esperanto-terminaroj aligendaj al ISO/FID-terminaroj.

Resume ni emfazas ke estas rekomendinde elverki la *kernojn* de *pont-* aŭ de *plurlingvaj terminaroj* ne laŭ la abc-sinsekvo, kiel ekzemple ankoraŭ estas aranĝita la „*Avant-projet de Vocabulaire des Télécommunications en 8 langues*” en ĝiaj apartaj sekcioj (I. *Ĝeneralaj* terminoj kiuj estas komunaj por la tri branĉoj *telegrafio*, *telefonio*, kaj *radio*; II. *Telegrafio*; III. *Telefonio*;

⁴⁾ Ties adreso estas UNESKO - 19, Avenue Kléber, Paris 16e.

IV. *Radio*), kie la terminoj estas ordigitaj laŭ la alfabeto de la franclingvaj vortoj. Kontraŭe estas rekomendinde, aranĝi laŭ sistema vidpunkto, uzante la UIDK-tabelojn kaj la suplementajn indicojn post *komo*. Tiuj indicaj numeroj same estas la ŝlosilnumeroj bezonataj por aligi nacilingvan terminaron.

Fine ni atentigas niajn anojn ke *Wüster* publikigos dum la kuranta jaro en la serio de la UNESKO-broŝuroj bibliografion pri *unulingvaj fakvortaroj*, kiel korelativon de la bone konata bibliografio de *Holmstrom*. La bibliografio de *Wüster* enhavos liston de ĉ. 1600 unulingvaj terminaroj normigitaj kaj ankaŭ de 400 aliaj unulingvaj fakvortaroj.

Ĉiu kiu ekverkas esperantan terminaron, unue konsultu la du bibliografiojn kaj havigu al si la tie menciitajn terminarojn koncernantajn sian fakon.

Nombregaj fak-asocioj internaciaj aperigis terminarojn de siaj fakoj. Interilati kun la koncerna fak-asocio internacia estas necese nur se ĉi tiu jam publikigis terminaron. Ekzistas listo pri tiuj asocioj, nome la „*Annuaire des Organisations Internationales*”, kiu estas eldonata ĉiujare en la eldonejo de „*Editions de l'Annuaire des Organisations S.A.*” en Genève.

413.164 : 413.239

MULTLINGVAJ FAKAJ VORTAROJ

de W. P. ROELOFS.

La granda nederlanda eldonejo Elsevier intencas eldoni grandan serion da multlingvaj fakaj vortaroj. La unua, pri televido, radioehado kaj antenoj, kun 750 paĝoj, aperos en ĉi tiu jaro. Ĉi tiu vortaro estos seslingva (angla/usona, franca, hispana, itala, nederlanda, kaj germana.) La ĉefa parto de la vortaro estas alfabete aranĝita laŭ la anglaj/usonaj terminoj, donas anglalingvajn difinojn kaj la tradukojn en la ceteraj lingvoj, kaj fine ankoraŭ referencan numeron. Por ĉiu el la aliaj lingvoj la vortaro enhavas alfabetan liston referencantan al la numeroj en la ĉefa listo. En prospekto pri ĉi tiuj vortaroj diriĝas: „Ilia aranĝo estis la temo de longaj diskuto kaj esploro kaj havas la benon de Unesco.” Ni konsideru la eblon kaj eventualan dezirindon publikigi esperantajn terminarojn referencantajn al la numeroj de la terminoj en ĉi tiuj Elsevier-vortaroj. Ĉe tio ekzistas du ebloj: aŭ la esperanta terminaro estas tute simila al la alfabetaj listoj de la malĉefaj lingvoj en la Elsevier-vortaro, kaj do uzebla nur en kombino kun tiu ĉi, aŭ la esperanta terminaro estas aŭtonoma, memstara, sed mencias la referenconumerojn de Elsevier. Ĉiukaze permeso de Elsevier kaj de la redaktoroj de la unuopaj vortaroj estos necesaj.